

N. N. 57,

Fratoj, al festeno bona Dio

tradukita de Ludwig Emil Meier

1. Fratoj, al festeno bona Dio
 Kunvenigis nin en kanta ĥor',
 Ĉiun zorgon tuj per energio
 Ni kuntrinkantuloj ĉasu for!
 |: Kie ŝaŭmas vin', val-le-ral-la!
 Ĝoj' florigas nin, val-le-ral-la!
 Kiel de l' printemp bela flor'.:|

2. Gaje ni traĝoju la junecon
 Kun amikoj bonaj en kunven',
 Ili donu al ni kontentecon,
 Kaj la vino estu kora ben'!
 |: Per vinbara fort', val-le-ral-la!
 Kontraŭ iu sort', val-le-ral-la!
 Ni jen armigitaj de deven':|

3. Ne trinketu nur el la pokalo,
 Kiam plena estas la barel',
 Kiu ĝuas vivon gute en tervalo,
 Ne konscias pri vivada cel'!
 |: Vagle trinku do! val-le-ral-la!
 Malplenigu, ho! val-le-ral-la!
 Plua pleno kuŝas en la kel'!:|

...

4. Kun lumanta sento la junulo
 Bonkuraĝe vagas tra vivad',
 Kaj kun amikeco de kunulo
 Li turnadas laŭ destina rad'.
 |: Vi do fidu min! val-le-ral-la!
 Ĝis de l' mondo fin', val-le-ral-la!
 Estos mi fidela kamarad':|

5. Ne sen uz' pasigu la junecon,
 El pokalo, laŭ konata fam',
 Vi elĉerpos veran la belecon:
 Ĉe knabina brusto kora am'!
 |: Kiam lasos nin, val-le-ral-la!
 La junec' kaj vin', val-le-ral-la!
 Nin akceptu, Ĥaron, via pram':|

*Traduko de la Germana poemo "Brüder, zu den festlichen Gelagen" de N. N. 57 en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 – †1919).*

Arg-833-1673 (2013-02-20 17:33:26)

Tradukita de Ludwig Emil Meier (16.02.1847 - 1919). Tiu ĉi traduko aperis en 1907 en la kant-libro „Esperantista Kantaro“, eldonita de la Esperanta Eldonejo Hans Theodor Hoffmann en Berlino. Pri la tradukinto Ludwig Emil Meier rigardu la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier.